



PILO-PRESS

Interncia Inform servo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 40/72 - 12 dec 1972

Aperas ĉiusemajne

Kongresinsigno por
la 59- UK Hamburgo

Dankvortoj de kanceliero Brandt

Bonn (PP) Al la gratulintoj okaze de la balota venko, federacia kanceliero Willy Brandt sendis jenajn dankvortojn:

Der Bundeskanzler

Über Ihre Glückwünsche habe ich mich sehr gefreut. Haben Sie herzlichen Dank.

Das Vertrauen der Mitbürger nimmt uns erneut in die Pflicht. Es bleibt unsere Aufgabe, ein Volk der guten Nachbarn zu sein, im Innern und nach außen.

La Esperanto-traduko tekstas:

"La Federacia Kanceliero

Pri viaj bondeziroj mi multe ĝojis. Akceptu koran dankon.

La fido de la kun-civitanoj denove devigas nin. Restas nia tasko esti popolo de la bonaj najbaroj, interne kaj eksteren.

Willy Brandt"

Ankaŭ Pilo-Press ricevis tiajn dankvortojn kun la propra subskribo.

Novajoj pri la 59-a UK Hamburgo 1974

Hamburgo (wb) L K K ĵus akceptis la kongresinsignon por la 59-a Universala Kongreso en Hamburgo (vidu supre!). Ĝi estis ankaŭ aprobita de UEA. La insigno fakte estas dukolora. La ruĝa silueto estas la kastelo (germanlingve "Burg", nome tiu de Hamburg). Ĝi fakte estas la oficiala blazono de Hamburgo kun la kristanaj simboloj super la tri turoj.

D-ro Werner Bormann kaj Hans Schütt, la prezidantoj de LKK Hamburgo, kaj la KKS de UEA, Mikulaŝ Nevan, subskribis la kontrakton pri la kongresejo en Hamburgo. Post la subskribo de la du direktoroj de la kongresoficejo la kontrakto nun estas valida; la kongresejo estas firme mendita! La luprezco estas 26.900 GM por salonoj por ĉiuj aranĝaĵoj, inkluzive de la solena inaŭguro, teatraj vesperoj, balo k.s. Se oni tion atentigas, la luprezco estas sufiĉe favora. LKK vidas eblon, ke pro tiu bone elkomerca prezo la kongreskotizo ne devos kunmarŝi en la ĝenerala prezaltiĝo, sed ke oni tenos la Beogradajn kotizojn de 1973 kaj restos sub la Portlandaj kotizoj el 1972.

Pri kongresoj, sporto kaj lingva evoluigo

Duisburg (PF) Pli ol cent esperantistoj el Nordrejn-Vestfalio k' de aliekunvenis dimanĉe, la 10 dec 72, por "kultura tago" kaj Zamenhof-festo. Fakte oni ne faris laŭdajn vortojn al Zamenhof, sed oni ekskluzive parolis la Zamenhofan lingvon, kio vere estis la plej efika omaĝo al Zamenhof. Inter la parolantoj troviĝis ankaŭ kelkaj eminentaj esperantistoj, kiel la aŭstralia ambasadoro kaj la ĝenerala sekretario de UEA.

La tuta tago, de la 10a ĝis la 20a horo, estis plenigita de riĉenhava, eble tro abunda programo, kiun preparis G. D. Winkler, la aganta prezidanto de REVELO kun kelkaj helpantoj. Ne mankis diskuto pri organizaj aferoj. Pro la fakto, ke la ĝisnuna REVELO-estraro retiriĝis de siaj funkcioj, REVELO nun estas sen estraro. Oni komisiis la agantan prezidanton baldaŭ kunvoki laŭstatutan membro-kunvenon, por elekti novan kompletan estraron, por kiu oni jam disponas pri kandidatoj.

Willi Brandenburg, GEFA-estrarano por informado kaj varbado, salutis en la nomo de la fervojistoj. Poste s-ino Köhler, Schwelm, montris lumbildojn pri la IFEF-kongreso en Lugano. La posttagmeza programo komenciĝis per prelego de Hartmut Trunte, gvidanto de la E-studrondo ĉe la universitato Bonn, kun kiu ankaŭ venis kelkaj el liaj rondanoj, junaj studentoj, pri la "principo de lingva evoluigo en Esperanto". Lia 18-paĝa prelego aperos baldaŭ kiel multobligajo kaj espereble ankaŭ en Esperanto-revuo.

Pri Portland kaj la ĉi-jara UK lumbildprelegis Günther Becker, la ĝenerala sekretario de UEA, kiu ankaŭ tuŝis movadajn problemojn. Li akcentis, ke la Portlanda kongreso vere estis tre impresa kaj sukcesa, kaj bedaŭris, ke la kongreso ne trovis la adekvatan informan atenton en la ĉi-landa Esperanto-medio.

Pri "Esperanto kaj Sporto" prelegis ambasadoro Ralph Harry kaj montris kelkajn mem fotitajn filmojn pri la Munkena Olimpiado, scenojn el la olimpia vilaĝo kaj kelkajn sportajn konkursojn, kiujn li persone komentis. Tiel la ambasadoro fariĝis unu el la unuaj sportaj reporterroj de Esperanto. La preleganto atentigis pri la neceso daŭrigi la sportan agadon en Esperanto kaj bonvenigis la decidon eldoni futbalistan broŝuron en Esperanto okaze de la Mord ĉampionado pri Futbaldo en FRG 1974.

Riĉenhava librostando de Ludwig Pickel trovis multajn rigardantojn kaj same multajn aĉetantojn. Montriĝis denove, ke librostando dum tiaj kunvenoj popularigas la Esperanto-literaturon.

Zamenhof-festo en Herford

Herford (PP) La ĉefaj parolantoj de la Zamenhof-festo en Herford estis Helmut Klünder kaj Ulrich Brandenburg, GEJ-agantoj. La konata Esperanto-programigisto, Hermann Behrmann, sukcesis enprogramigi vizitojn ĉe du Zamenhof-festoj, nome antaŭtagmeze en Duisburg kaj posttagmeze en Herford.

Würzburg. Zamenhof-festo en Würzburg okazis la 7 dec 72, dum kiu W. Berger, Kitzingen, montris lumbildojn pri Portland.

GEFA-Bulteno 20-jara

Frankfurt/M (PP) Antaŭ 20 jaroj, en Oktobro 1952, eliris la unua numero de "Bulteno", la presita informilo de GEFA, Germana Esperanta Fervojista Asocio. Jubilea artikoleto aperis en n-ro 5/1972 de "Bulteno". El ĝi oni ekscias, ke ekde la 7 okt 72 funkcias kiel prezidanto de GEFA, Joachim Gießner, kiel vicprezidanto kaj redaktoro Wilhelm Grass, kiel sekretariino Elfriede Kruse, kiel kasisto Kurt Jentsch. Aliaj estraranoj estas: Willi Brandenburg por informado, varbado, fakprelegoj; Gernot Ritterspach por terminaraj aferoj kaj Werner Heimlich, jr., por junularaj aferoj.

+++++

Prof. Lapenna en Luksemburgo 1973

Luksemburgo (wb) Surbaze de invito de la prepara komitato por la plurlanda kongreso en Luksemburgo la prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, ĵus akceptis fari la festprelegon dum la solena inaŭguro. La kongreso pritraktos en sia labora parto la lingvajn problemojn de la integriĝanta eŭropo de la naŭ ŝtatoj. Pro la hotelaj malfaciloj estas petite, tre urĝe anonci sin.

German-pola dissendo

Hamburg (wb) Dum ĉiutaga unuhora dissendaĵo por junuloj kun muziko kaj intervjuoj, kutime ellaboritaj de NDR II kune kun iu eksterlanda radiostacio, jaŭdon la 7-an de decembro okazis detala interparolado kun s-ino Erika Dobrzyńska, nask. Rauschert el Hamburg, nun vivanta dum pli ol 5 jaroj en Varsovio kiel edzino de la konata esperantisto, Roman Dobrzyński. S-ino Dobrzyńska lerte kaj dum sufiĉe longa tempo klarigis esencajn erojn de la lingvo Esperanto. Ankaŭ estis disaŭdigita belega kanto de la konata aktoro Andrzej Tomecki demonstranta la vivantecon de Esperanto. La stulta intervjuanto el Hamburg elstarigis sian preferon por la angla sed devis promesi, ke li pli bone informigos pri Esperanto okaze de la mondkongreso en Hamburgo. Bendon kun la elsendita teksto havas s-ro Karl-Heinz Hoffmann, 2 Hamburg 54, Gemseneck 14, tel. 0411-543949.

Delegitoj de UEA

Statistikoj estas interesaj legaĵoj. En antaŭa numero de Germana Esperanto-R_evuo eblis per statistiko pruvi, ke la germanaj Esperanto-kongresoj ne havas falantan viziton. Nun aperis en la jarlibro de UEA, dua parto, la nombrocifero de 1971. El la tuta membrocifero elstare interesas la individuaj membroj de UEA: ili estas 7.022. En la unua parto de la jarlibro troviĝas la nombro de la delegitoj de UEA: 3.501. Do la duono de la individuaj membroj de UEA samtempe estas delegitoj! Devus esti pli da membroj, kiuj montras sian pretecon servi al aliaj esperantistoj. Laŭ landoj staras je la pinto Francio kun 325 delegitoj, la vicpinton havas Britio kun 295. Federacia Respubliko Germanio troviĝas sur la tria loko kun 274 delegitoj (poste USONO 216, Svedio 200, Italio 185, Nederlando 181 ktp) GEA apelacias al siaj membroj fariĝi delegito de UEA. Celo por 1973 estas delegita kresko je 20 %. Tiam la delegita nombro por FRG estus 329. Ek al la pinto!

Demento

Kun bedaŭro ni konstatas, ke en la lasta numero de Pilo-Press, n-ro 39/72, paĝo 4, rubriko "La semajno en la radio" enŝteliĝis "informa anaso". Ne "f-ino F. Szabó" estis en Moskvo, sed "S-ino Flora Szabó - Felső". Por eviti eventualan miskomprenon, ni deklaras, ke ambaŭ estas identaj.

Sekreto

En la aŭstralia ambasado en Bonn troviĝas "du Esperanto-parolantaj brakseĝoj". Pri la sekreto de tiuj "lingvaj mirakloj" nur scias la aŭstralia ambasadoro, Ralph Harry.

Cedema diplomato

Unu el la diskutpunktoj rilate al la sporta kampanjo estas la sportaj terminoj, speciale la nomo por la ludo per la leda pilko: Ĉu futbalo aŭ piedpilko? En sia broŝuro "Saluton amiko" ambasadoro Harry preferis "futbalo". En Duisburg nun la aŭstralia ambasadoro deklaris, ke li estas "ĝisosta fundamentisto" kaj akceptos ankaŭ "piedpilkon", se oni faros definitivon. La plej kompetenta persono por tia decido estas laŭ li Tibor Ujlaki-Nagy, la aŭtoro de "La Sporta Lingvo en Esperanto".

Hattingen kun du Esperanto-kursoj

D-ro H. M. Maitzen, aŭstro-devena astronomo en Bochum, gvidas du Esperanto-kursojn en Hattingen, unu por komponantoj, la alian kiel konversacian kurson.

Imitinda ekzemplo

La estraro de GEFA donacis al fervojaj emerituloj kaj siaj fidelaj membroj, 15 laŭnombre, Esperanto-libron.

La Semajno en la radio

Berno. Merkrede ges-roj Gacond malfermis sian "jaron leterkeston" ĝis Britio. Ankaŭ en la venontaj elsendoj oni respondos al la korespondaĵoj de aŭskultantoj, ankaŭ el Germanio. - A. Baur parolis lunde pri la plej granda hotelo en Svislando (Zürich) kaj pri modernaj hotelaj servoj. Romo. Laŭ informo de s-ro Conrad Romo ĉi-foje estis aŭdebla en Munkeno. Pro vojaĝaj kaŭzoj raporto el Nürnberg ne eblas.

Varsovio. El la leterkesto ni eksciis, ke nur malmultaj aŭskultantoj skribas pri politikaj temoj. Al tiuj malmultaj apartenas ĉefe germanaj esperantistoj. Unu aŭskultanto ekz, menciis la frapan maksimuman konformecon en la politikaj komentarioj. - La dimanĉa Esperanto-ekspreso ne estis aŭdebla en Duisburg. - Post dumnokta veturado de Duisburg al Nürnberg mi alvenis ĝustatempe en Nürnberg, por aŭskulti la lundan pli ampleksan version de la Ekspreso. Jerzy Grum eligis siajn pensojn okaze de la alproksimiĝanta librotago kaj naskiĝtago de Zamenhof. Oni aŭdigis la rememorojn de la iama pola ĉefdelegito, Roman Sakowicz, pri renkontiĝoj kun Zamenhof. - En Duisburg mi denove povis konstati, ke esperantistoj konatiĝas kun Pilo-Press el la Varsoviaj Elsendoj. Inverse Pilo-Press jam kelkajn instigis al regula aŭskultado de Esperanto-elsendoj. - Pekino kaj Zagreb kiel kutime bone aŭdeblas.